# NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice n-ro 5/2000

## INVITO AL CZERNA

Septembro kaj oktobro favoras al ekskursoj. Tagoj estas ankoraŭ sunaj, varmaj sed jam ne varmegaj kaj aŭtunaj koloroj ĝojas okulojn. Ni preparu sin por vojaĝo al Czerna apud Krzeszowice. Ni trovos tie du vizitindajn obiektojn: la Klostron de Senŝuaj Karmelanoj kaj belegan Valon de Elio. Por atingi ilin oni devas forveturi buse, bicikle aŭ foriri piede el stacidomo en Krzeszowice 4 km norden [ laŭ flava turisma signo]. Ĉe la bushaltejo Czerna I , ni direktas dekstren kaj post cirkaŭ 250 m ni proksimiĝas al „ Diabla Ponto" super rivereto Eliaszówka, kie la vojo disforkiĝas . La kruta vojo maldekstre kondukos nin al la klostra monteto kaj dekstra gvidos nin profunden de Elia Valo."Diablan Ponton" oni konstruis en 17. jc, ĝi ligis la klostron kun montetoj kie troviĝis ermitejoj. La ponto havis grandegajn formatojn; longa 120 m, larĝa 9,5 m. Subtenis ĝin 11 arkaĵojn- 18 m altajn. Irante plu laŭlonge de la rivereto, ni proksimiĝas al „ Elia Fonto", nomata ankaŭ " Ama Fonto". Ĝi havas la formon de koro kaj la akvo stimulas senton de amo. Gejunuloj elektis ĉi tiun lokon por enmanigi fiancajn ringojn.




Sed la ĉefa celo de nia ekskurso estas la klostro. Kiam ni grimpigis jam supren, preterirante tri kapeletojn, ni rigardos ĉirkauigitaj per ŝtonaj muroj klostran konstruaĵon kaj preĝejon, al kiu kondukos nin belega, baroka pordego el nigra marmoro. Ĉe la enirejo ni povas tralegi detale priskribitan historion de la klostro. Maldekstre ni rigardos tirputon profundan 21 m, kovritan per sinda tegmento en kupola formo.Trapasante la klostran pordegon ni povas eniri vendejeton kun diversaj devotaĵoj. Neksta pordego kondukos nin al la preĝejo. La interno de la sanktejo fascinas per pureco de frutempa, baroka stilo. Tri altaroj skulptitaj en fama, nigra marmoro el proksima Dębnik bele distingiĝas sur la fono de blankaj muroj. En la flanka altaro situas mirakla bildo de Skapulara Dipatrino, kiu estas kopio de Neĝa Dipatrino el Sankta Maria Maggiore en Romo.

En la klostro longajn jarojn pasigis pastro Rafał Kalinowski , kiu grave meritis por renovigo de klostra vivo. En 1991 la papo Johano Paŭlo la Dua kanonizis lin. Unu el la kapeloj estas oferita al la reliktoj de sankta Rafał Kalinowski .Vizitinda estas ankaŭ la klostra muzeo, enhavanta diversajn memoraĵojn el misioj en Afriko. Sur la klostra deklivo oni vidas skulptitajn staciojn de Kalvaria Vojo. Silento kaj trankvilo de ĉi tiu loko favoras al kontemplado kaj ripozado.

*Barbara Sułkowska*

## INTER LA FERVOJISTOJ ESPERANTISTOJ

En 22.09. – 24.09. 2000 mi partoprenis la XVI Kongreson de Polaj Fervojistoj Esperantistoj en Siedlce. La inviton mi ricevis de organizantino de la Kongreso- Halina Sobiech, kiun mi ekkonis junie en Mielno dum la 22-a ĈEP. Kvankam la ekspreso al Varsovio malfruiĝis 45 minutoj kaj la opinio de plimulto da vojaĝintoj pri solideco de PKP ne estis tro favora, la organizantoj d la Kongreso- fervojista esperantistaro, savis la honoron de sia entrepreno. La Kongreson partoprenis 51 personoj [ 16 el Siedlce, 34 personoj el la ceteraj partoj de Pollando kaj unu el Blankrusia Grodno.]

La programo de la aranĝo estis tre interesa kaj varia. Jam dum la unua tago, vendrede posttagmeze la kongresanoj ekkonatiĝis kun la urbo Siedlce kaj regiono Podlaŝio rigardante kune la video-filmon pri la pasinta kongreso kaj partoprenante bivakfajron en apudurba belega, arbara ripozejo por ĉasistoj. Ni vespermanĝis [ varma brasiko, rostitaj kolbasetoj, biero el barelo], kantis kun akompano de akordiono kaj gaje pasis la tempon ĝis malfrua vespero.

Sabate, post la oficiala solena malfermo kaj ne tro longa debato en la Urba Kulturcentro kun ĉeesto de multaj fervojistaj kaj urbaj eminentuloj- okazis aŭtobusa ekskurso tra la regiono Podlaŝio. Dum la longa ekskurso sub gvidado de nia ĉiceronino Danuta Mączka, ni vizitis multe da historiaj monumentoj kaj lokoj ligitaj kun naciaj ribeloj 1830 kaj 1863 [ la batalo apud urbo Węgrów] kontraŭ carismaj okupintoj. Ni vizitis la sanktejon al Dipatrino kaj fonton ligitaj kun batalo kontraŭ formortinta jam gento de Jadźwingowie en Budziszyn, la bazilikon kaj aliaj antikvaĵoj de la urbo Węgrów, la ruinaĵon de la mezepoka kastelo kaj muzeon en Liw, la unikan en Pollando preĝejon, konstruitan dum la hitlerana okupado en jaroj 1940-42 en vilaĝo Hołubla, la renovigatan nun palacon de familio Kuczyński en Korczew, la palacon iam konstruitan de la familio Radziwiłł kaj nun okupitan de la Pola Nacia Banko. En la bufedejo „ Zorza", proksime de la palaco ni tagmanĝis. Ni havis okazon gustumi la lokan pladon- terpoman kolbason. Post reveno el la ekskurso atendis nin la luksa vespermanĝo kiu daŭris ĝis la noktomezo.

Dimanĉe matene ni ĉeestis la sanktan meson en la antikva kapelo, fondita de la princino Aleksandra Ogińska. Post la sankta meso, plejparte celebrita esperante, dum kiu belege predikis pastro Piotr Sadownik, ni vizitis la antaŭ nelonge kreitan Diocezan Muzeon en Siedlce.La muzeo posedas multe da tre interesaj kaj valoraj antikvaĵoj de eklezia arto- ĉefe el la regiono Podlaŝio. Post la vizito en la muzeo ni trairis al la pli supra etaĝo de la sama konstruaĵo kie troviĝas la loka Katolika Radio Podlaŝio. L redaktorino konatiĝis nin kun la kondiĉoj kaj funkciado de radiostacio. Poste, antaŭ la reveno por tagmanĝo- ni promenadis kune kun nia ĉiceronino tra la antikva kvartalo de la urbo, rigardante el ekstere la pli gravajn obiektojn kiel ekzemple: la palacon de Aleksandra Ogińska en kiu gastis la reĝo Stanislao Aŭgusto Poniatowski, la gimnazion en kiu dum jaroj 1862-63 lernis Aleksander Głowacki [Bolesław Prus], la urbodomon, la katedralon, la preĝejon al sankta Stanislao kaj multe da aliaj.

Dum nia tuta tritaga restado regis la bela suna vetero. Post la tagmanĝo kaj lasta babilado sekvis trista momento de la nepra adiaŭo kaj forveturo. Mi estas dankema al la bonegaj organizantoj de la Kongreso kaj precipe al Halinka Sobiech kaj al Józef Duma- la prezidanto de PEA en Siedlce pro tiel sukcesa E- aranĝo.

*Zbigniew Duda*

## ANTIKVAĴEJO

Antaŭ **110** jaroj La internacia lingvo havis jam tri jarojn. En Nurnbergo aperadas unua esperantista gazeto " La Esperantisto". Jam dekomence (1889), la gazeto travivas gravajn financajn problemojn. Ankaŭ Ludoviko Zamenhof kaj lia familio travivas malfacilajn jarojn. Li vane serĉas lokon en kiu lia kuracista praktiko povus certigi modestajn vivkondiĉojn.

Antaŭ **100** jaroj Komencis rapida disvolvigo de nia lingvo. En Francio, Belgio, Ruslando kaj Brazilo malfermiĝis publikaj kursoj kun granda sukceso. Tiu periodo, nomata „Franca Periodo" estis tre grava en nia historio. Inter francaj pioniroj agis barono Louis de Beaufront. Lia energia, lerta, multflanka kaj vigla agado pliigis en Francio multege da novaj entuziastoj. Bedaŭrinde, lia posta fiagado, tn. Ido-skizmo, kaŭzis, ke L. de Beaufront konserviĝis en nia memoro kiel Judaso Iskarioto de la E- movado.

Antaŭ **75** jaroj En Parizo okazis du grandaj konferencoj pri uzo de Esperanto en scienco kaj tekniko. Membroj de l'Akademio de Sciencoj publikigis manifeston deklarante inter alie:
oficialigon de Esperanto en internaciaj kongresoj kaj instruadon de tiu lingvo en ĉiuj instruejoj.

2-7 de aŭgusto okazis la 17-a Universala kongreso en Genevo kiun ĉeestis 953 anoj.

En Krakova Societo Esperanto, juna esperantisto s-ano Maksymilian Ziomek sukcesis fondi la Sekcion de Esperantista Junularo. La senlaca samideano Ziomek veturis ankaŭ al Niepołomice, kie li prelegis pri Esperanto dum la kunveno, kiun partoprenis ĉirkau 100 personoj. Pli poste li fondis tie Esperanto- grupon.

Antaŭ **50** jaroj Okazis 35-a Universala Kongreso en Parizo. Partoprenis 2325 anoj. Ĉiuj kunsidoj havis lokon en la Sorbono, la sidejo de la Pariza Universitato.

En Pollando daŭris, kiel skribas Marian Kostecki en siaj Krakovaj Esperantaj Kronikoj , silenta, malfavora periodo, reganta dum la jaroj: 1948- 1955, kaŭzita per politikaj motivoj de stalinismaj, ŝtataj instancoj. Nur nia estiminda prof. Mieczysław Sygnarski, senĉese kaj obstine kontinuis sian pedagogian laboron gvidante lektoraton de Esperanto en Jagelona Universitato.

Antaŭ **25** jaroj Okazis 60-a Universala Kongreso en Kopenhago. Ĉeestis cirkaŭ 1100 kongresanoj. La honora membro de UEA estiĝis prof. M.Sygnarski. La sepdekajn jarojn oni povas sentroige nomi- " la ora periodo de Esperanto en Pollando". En 1975 PEA nombris pli ol 5000 da membroj. Oni instruis Esperanton en pli ol 100 lernejoj. Ars Polona eldonis inter alie tradukojn de " Faraono", " Sinjoro Tadeo", kaj "Quo Vadis". La konata monatrevuo "Polska' aperadis esperantlingve.

Prilaboris: *Andrzej Kołpanowicz*

Bibliografio: Historio de Esperanto- Leon Courtinat
Krakovaj Esperantaj Kronikoj- Marian Kostecki